

La juda ŝtato estas sesdekjara*

Josef Ŝemer

La juda ŝtato *Israelo* estas unu el la plej popularaj lokoj ĉe la internaciaj gazetaro, televido kaj aliaj mondaj amaskomunikiloj. Ĝia nomo aperas preskaŭ ĉiutage sur iliaj ekranoj aŭ gazetaĵoj. Se surteriĝus gasto el Marso, li certe kredus ke temas pri granda potenco, simile al Usono, Rusujo aŭ Germanujo. La amaskomunikiloj ege ŝatas la konflikton inter Israelo kaj la Palestinanoj. En diversaj foraj partoj de la mondo okazas ĉiutage sangaj incidentoj, multfoje tre teruraj kaj tragikaj; sed ĉar tie apenaŭ ĉeestas reporteroj kaj kamerauloj, oni malmulte raportas pri ili kaj preskaŭ ne montras ilin. Sed se en Israelo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo okazas eta incidento, ĝi tuj aperas en la salonoj de la spektantoj en Eŭropo kaj la cetera mondo.

La rezulto do estas, ke la ordinara novaĵkonsumanto ricevas la impreson, ke en Israelo okazas ĉiutaga militado kaj senĉesaj sangaj incidentoj kaj regas surstrataj timo kaj malpaco.

Kompreneble multas la sekurecaj problemoj en Israelo kaj la regiono, sed ĝi havas ankaŭ aliajn interesajn kaj eĉ unikajn aspektojn, malpli konatajn. Ĝuste ilin mi deziras iomete bildigi, okaze de la *60-jariĝo* de tiu ĉi ŝtato.

Israelo fondiĝis en majo 1948, sekve de decido de la Ĝenerala Asembleo de UNO. Okazis tiam terura milito inter la defendarmeo de la ĵus fondita juda ŝtato kaj la atakantaj militfortoj de la Palestina loĝantaro, helpitaj de la armeoj de kelkaj najbaraj arabaj ŝtatoj.

Mi ne deziras priskribi la rezultojn de tiu ĉi milito, kiuj estis ege tragikaj precipe por la Palestinanoj (la fakto ke kelkaj centmiloj da ili forlasis siajn loĝlokojn kaj fariĝis rifuĝintoj ktp). Pri tio mi eble skribos alfoje. Nun mi rakontos pri kelkaj evoluoj, grandparte bonaj kaj parte malbonaj, kiuj okazis en Israelo dum la pasintaj 60 jaroj *krom* (kaj malgraŭ!) la militado kontraŭ la arabaj ŝtatoj kaj terororganizaĵoj.

Unu de la plej grandaj sukcesoj de Israelo estis la *enmigrado* de 3 milionoj da judoj, venintaj el ĉiuj mondpartoj. Jam en la unuaj jaroj de ĝia ekzisto Israelo akceptis tian kvanton da alvenintoj, kiu superis la nombron de la loka loĝantaro. Tiu ĉi granda relativa amplekso de la enmigrado al Israelo estas unika fenomeno en la tuta mondo. Rezulte de tio vivas nun en Israelo preskaŭ duono de la tutmonda juda popolo. En 1948 vivis tie nur 650,000 judoj, do nur eta parto de la tiama 11-miliona tutmonda judaro. Nun vivas tie ĉirkaŭ 7 milionoj da loĝantoj, el ili 76% estas judoj (la ceteraj Israelanoj estas islamaj kaj kristanaj Araboj kaj rusdevenaj kristanoj).

Malgraŭ multaj malfacilaĵoj, la judaj novenmigrintoj plene absorbiĝis en la israelajn socion kaj ekonomion kaj iliaj infanoj jam regas la hebrean lingvon tute nature.

Resume, la temo de la juda enmigrado al Israelo estas granda sukceso.

Alia temo estas la *ekonomia* evoluo de Israelo. Antaŭ 60 jaroj tiu ĉi juna ŝtato, naskiĝinta dum milito, troviĝis en tre mizera ekonomia stato. Sed tio draste ŝanĝiĝis dum la jaroj precipe dank` al du faktoroj:

1. La granda mona helpo ricevita - donace kaj prunte - de la tutmonda judaro, la subvencioj kaj pruntoj ricevataj dum la jaroj de la Usonaj registaroj, kaj la Holokaŭsto-rekompenca mono veninta el Germanujo;

* Aperis en *Monato* en oktobro 2008.

2. La talento kaj kreivo de la israelaj civitanoj, kies rezulto estas interalie mondkonata altnivela agrikulturo, ege altnivelaj pinto-industrioj ("Hi-Tec", alta teknologio) kaj multaj diverskampaj sukcesoj teknologiaj.

En 2007 la jara kresko-procentaĵo de la israela ekonomio estis pli ol 5%. Israelo troviĝas inter la plej evoluintaj landoj rilate kompaniojn de alta teknologio kaj scienco. En la lastaj jardekoj ĝi fariĝis "Hi-Tec"-imperio, kies membroj eltrovas senĉese novajn rimedojn, patentojn kaj metodojn, eksportante ilin al la tuta mondo. Ne nur lokaj firmaoj kun tre talentaj kreivaj laboristoj produktas tre saĝajn instrumentojn kaj metodojn; ankaŭ ne malmultaj eksterlandaj kompanioj aĉetis en la lastaj jaroj sukcesantajn israelajn firmaojn kaj adaptis israelajn inventojn.

Malmultaj ŝtatoj en la mondo sukcesis transsalti tiel alten dum 60 jaroj: de vivnivelo de \$3,100 por persono en 1948, al nivelo de \$25,000 en 2007. Konsidere de la fakto, ke dum tiuj 60 jaroj Israelo trapasis kelkajn militojn kaj ke tiu ĉi eta ŝtato devas daŭre dediĉi grandan parton de sia buĝeto por defendo (armeo), tiuj ĉi atingoj estas tre elstaraj. Dum ses jardekoj la israela ekonomio pasis plenan revolucion: de malnova fermita socialisma ekonomio, kiu estis plenregata de la registaro, ĝi transiris al malfermita konkurenco-hava kapitalismo, kiu ebligis grandsukcesan adaptiĝon al la ekonomia globalismo.

Ĉio-ĉi ege akcelis la kreskadon de la ekonomio, sed la ekspansio havas ankaŭ nigrajn makulojn: flanke de la atingoj kreskegis la interspaco inter la grandaj riĉuloj kaj la vastaj malriĉaj tavoloj. Israelo, kiu estis konsiderata en la 50-aj jaroj unu el la plej ekonomie egalecaj ŝtatoj, fariĝis en la 21-a jarcento – statistike - la plej *malegaleca* ŝtato el ĉiuj okcidentaj ŝtatoj. Tiu ĉi ŝtato estas timiga. Ne pri tia socio revis siatempe la fondintoj de la juda ŝtato kaj la Cionistaj pioniroj, kiuj fondis la famajn egalecajn kooperativajn vilaĝojn - la "kibucojn".

Alia nigra makulo estas la *korupto*, kiu fontas ĉefe de la firmaj ligoj inter *mono* kaj *regopovo* (alidifine: kapitalo kaj reĝimo). Verdire ne tiom temas pri ŝtatoficistoj kiuj, ricevas subaĉetan monon, same kiel okazas laŭdire en la "Tria Mondo" kaj en diversaj eksocialismaj ŝtatoj. Temas pli pri ministro aŭ alia ŝtata aŭ municipa servanto, kiu ebligas karieran prioritaton al sia sampartiano aŭ amiko ktp. Tiuj ĉi negativaj kondutmanieroj pli oftas nuntempe en Israelo ol en okcidenta Eŭropo kaj endanĝerigas la stabilecon de la socio kaj reĝimo.

Rimarko: la internacia indico de korupto (CPI, anglalingve: Korupto-percepta Indico) ekzamenas ĉiujare la nivelon de la korupto en la tuta mondo kaj publikigas "notojn" donitajn al 180 ŝtatoj. Ne temas pri efektivaj korupto-agoj sed pri la maniero laŭ kiu aferistoj kaj specialistoj perceptas la korupton regantan en la diversaj ŝtatoj. Laŭ la rezultoj de la jaro 2007 Israelo troviĝis en la 30-a loko (el 180), dum en la unuaj lokoj aperis Finnlando, Islando, Danujo, Svedujo, Singapuro kaj Nov-Zelando. (la plej "puraj" landoj...). En la lasta loko aperis Somalio.

Jen: http://en.wikipedia.org/wiki/Corruption_Perceptions_Index

Burokratio

Temas pri bedaŭrinda restaĵo de la tiamaj jaroj, kiam en la evoluanta nova socio en Israelo pli kaj pli multiĝis la burokratismo. Mallerteco daŭre ekzistas en la agado de multaj registaraj instancoj kaj la publika sektoro (registaraj ministerioj, municipaj instancoj kaj aliaj publikaj kaj ŝtataj korpoj) estas ŝvela, havante tro da laboristoj, laŭ tio

kion diras la fakuloj. Ekonomikistoj diras, ke en Israelo la relativa nombro de la ŝtataj oficistoj estas pli alta ol tiu de la aliaj "okcidentaj" landoj.

Universitatoj kaj scienca esplorado

Priferinda estas la granda progreso okazinta sur tiuj-ĉi kampoj. La israela ŝtato kaj la eksterisraela juda popolo multe investis en fondo kaj plifortigo de israelaj universitatoj kaj de institutoj por scienca kaj teknologia esploro. La rezultoj estis tre sukcesaj: ekzistas 7 universitatoj kies nivelo egalas tiun de la plej bonaj universitatoj de Usono kaj Eŭropo. Israelaj esploristoj troviĝas inter la plej multaj kontribuantoj de sciencaj publikaĵoj. 4 Israelanoj ricevis nobelopremiojn dum la lastaj 10 jaroj: pri ĥemio kaj ekonomiko.

Krom universitatoj ekzistas ne malmultaj superaj lernejoj. Multaj esploraj institutoj kaj "kompanioj por aplikado" funkcias apud la universitatoj kaj enspezigas al ili multe da profitoj. Tiu ĉi modelo estis kreita en Israelo kaj estis poste adaptita en aliaj landoj. Ekzemple, apud la mondfama scienca instituo Weizmann funkcias kompanio kiu enkomercigas la inventojn akiritajn de la sciencistoj. Tiu ĉi instituto disponas pri pli ol 1,500 familioj de patentoj kaj pere de tiu ĉi ligita kompanio li sukcesas transformi ilin en profitodonajn komercajn projektojn. Dank` al la bonaj "cerboj", kiu laboras en la universitatoj kaj aliaj sciencaj kaj teknologiaj instancoj, Israelo atingis la unuan lokon en la mondo rilate investon en esploro kaj evoluigo rilate al la Malneta Nacia Produkto (MNP).

Sed en la lastaj jaroj la afero ŝanĝiĝas: la registaro bedaŭrinde malpli investas en tiu ĉi kampo, neglektante kaj riskante la pluan evoluon de la universitatoj. Lastatempe oni multe avertparolas pri tio, ke Israelo troviĝas sojle de akra ŝanĝiĝo en la malan direkton: de evulo al malevoluo. Tre negativaj sekvoj estas la elmigro de multaj israelaj sciencistoj-esploristoj kaj diversfakaj universitataj al Usono kaj aliaj okcidentaj landoj. Kaj pro la malbona ekonomia stato de la israelaj universitatoj kaj pro la drasta malaltiĝo de la ŝtata subteno, multaj talentaj homoj veturas transmaren. Laŭ nova enketo ni eksciis nur lastatempe, ke Israelo troviĝas en la unua loko en la mondo rilate "eksporton" de sciencistoj kaj universitataj al Usono: la relativa nombro de la Israelanoj, laborantaj en usonaj universitatoj, esplorinstitutoj kaj firmaoj, estas kelkoble pli alta ol tiu de aliŝtatanoj. Jen la timigaj oficialaj ciferoj: La nombro de la Israelanoj, kiuj laboras nuntempe nur en usonaj universitatoj, egalas 25% (!) de la nombro de la stabanoj de la israelaj universitatoj. Do, grandega *cerbulforfuĝo* (angle: "brain drain") okazas al ni.

Tiu ĉi punkto min persone ege-ege zorgigas. Tio endanĝerigas la intelektan superecon akiritan de la israela ŝtato dum la lastaj jardekoj. Se vi aldonas al tio la malaltiĝon de la nivelo de la plibaza israela eduka sistemo (rezulte de malaltaj salajroj pagataj al la instruistoj), la estonteco ne aspektas rozkolora.

Sansistemo kaj medicino

La israelaj medicino kaj sansistemo akiris multajn atingojn. La loka medicino troviĝas inter la plej bonaj en la okcidenta mondo. Jen kelkaj atestoj: La averaĝo de la vivlongo en 2005 estis 79 jaroj ĉe viroj kaj 83 jaroj ĉe virinoj, do inter la plej altaj en la mondo. La vivlongo kreskis el 1948 je 15 jaroj; La procentaĵo de morto ĉe la novnaskitoj estas inter la plej malaltaj en la tuta mondo: 4 el 1,000. (antaŭ 30 jaroj: 22 el 1,000). La nivelo de la israelaj kuracistoj (inter ili relative multaj araboj!) estas tre alta kaj la uzo

de teknologioj modernaj estas unuaranga.

Transportado

Granda malsukceso okazis sur la kampo de transportado. Dum en preskaŭ ĉiuj evoluintaj landoj ekzistas jam delonge vasta efika reto de trajnoj, metrooj kaj aliaj rimedoj por publika transportado, en Israelo oni dum jaroj neglektis tiun ĉi temon ("mankas mono", diradis la registaroj). Nur en la lastaj 10 jaroj oni komencis pligrandigi la trajnan sistemon sed ĝis nun la stato ankoraŭ ne estas kontentiga. Ankoraŭ ne ekzistas en Israelo metroo. Al mia urbo Tel-Avivo, kiu estas la ĉefa metropolo de Israelo, eniras ĉiutage ĉirkaŭ duonmiliono da veturiloj. Sed la solaj publikaj transportiloj en la urbo mem estas aŭtobusoj kaj taksioj. Tute ne ekzistas tie metroo aŭ rapida trajno...

Demografio

Okaze de la lastjaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto mi vizitis Italujon kaj Japanujon. Mi eksciis tiam ke en ambaŭ landoj la nasko-procentaĵo estas tre malalta. La lokaj Esperantistoj plendrakontis al mi, ke ĉe ili la junuloj ofte preferas ne naskigi infanojn. Mi eklernis ke tiu ĉi fenomeno okazas nuntempe ankaŭ en aliaj "okcidentaj" landoj. Feliĉe en Israelo la stato estas tute alia: la averaĝa nasko-procentaĵo estas tre alta kompare al la cetera moderna mondo: 3 infanoj por virino. Tio certigas plikreskadon de la loĝantaro, do tre pozitiva afero.

Jen kelkaj *interesaj faktoj*:

- Israelo troviĝas en la relative dua loko en la mondo laŭ la nombro de libroj eldonataj ĉiujare kaj en la relative unua loko en la mondo laŭ nombro de personaj komputoroj.
- Israelo estas la sola ŝtato en la mondo kiu eniris la 21-an jarcenton kun pli granda nombro da arboj ol ĝi havis komence la 20-a jarcento.
- Multaj "triamondaj" ŝtatoj helpiĝas de Israelo pri rimedoj por agrikultura progresigo kiel akvumado, plibonigo de la tero kaj de la rikoltoj ktp.
- La israelaj bovinoj liveras la plej grandan kvanton da lakto en la mondo, rezulte de diversaj teknologiaj inventoj.
- Jam de kelkaj jaroj Israelanoj troviĝas inter la 3 unuaj lokoj en la mondo laŭ relativa nombro de registro de patentoj.
- Miraklo: en Israelo oni sukcesis eltrovi teknologiajn metodojn por kulturi legomojn en la dezerto, akvumante ilin per modifita sala akvo.
- Israelo estas unu el nur *tri* aziaj ŝtatoj (la aliaj estas Japanujo kaj Koreujo), kiuj aperas en la kongresa kotiztabelo de UEA sub Kategorio A, kio signifas ke ĝi estas konsiderata kiel riĉa lando.

(laŭ mi tute malĝusta difino, ĉar efektive multaj israelaj samideanoj ne povas permesi al si veturi al UK pro manko da monrimedoj...)

Do, multaj atingoj, iusence eĉ mirakloj, okazis en la relative nova juda ŝtato ekde ĝia fondiĝo antaŭ 60 jaroj. Samtempe multaj problemoj kreiĝis, eĉ sen kalkuli la plej grandan kaj akutan problemon: la senĉesa vivdanĝero pro minacoj venantaj el malamikoj, kiuj ankoraŭ ne akceptas la ekzistorajton de tiu ĉi ŝtato. Kiel dirite, tiun ĉi tiklan temon mi preskaŭ ne tuŝis ĉi-tekste, malgraŭ ke ĝi estas enorma.

Lasta frazo: Se malgraŭ la supre menciita vivdanĝera stato okazis en Israelo dum 6 jardekoj tiom da progreso kun tiom da sukcesoj, ni povas nur imagi kiujn enormajn atingojn povus havi la juda ŝtato se paco kaj harmonio regus en la regiono...